



Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝtato.
(JOH., X, 16.)

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

Kiel praktike plenumi la Deziresprimojn balotitajn en „NIA DUA”?

Nia Redaktoro, en sia iniciatplena artikolo en la Oktobra numero de E. K. p. 214, prave rimarkigas: „la plej brilaj kaj sukcesaj kongresoj estus tute senfruktaj, se iliaj konkludoj kaj decidoj daŭrus esti nur paperaj”

Do, post la kongreso, ni ne sidiĝu kontentaj, sed „ni *iru* la vojon montritan”.

Efektive, mi ĉeestis multajn kongresojn, (eĉ esperantistajn) sed, mi devas konfesi, ke, krom la plezuro interrilati kun samideanoj, kaj disvastigi, per la raportoj en la presaro la celon de niaj movadoj, la plimulto de tiuj kongresoj ne naskis praktikajn planojn por plenumi la multajn tre ŝatindajn deziresprimojn, unuanime kaj entuziasme balotitajn de la kongresanoj. Ne tia estu la efiko de niaj kongresoj!

Por malhelpi tian malfeliĉaĵon, la organiza Komitato de „Nia Dua” havigis, dank’ al la afableco de S-ro Prof-ro ERNEST POMPE, el la Teologia Seminario „Beekvliet”, lertan latinan tradukon de la Deziresprimoj, balotitaj post ĉiu el la 6 Laborkunsidoj de la kongreso. Tiujn Deziresprimojn,

latine kaj esperante verkitajn, la komitato sendis unue al Nia Sankta Patro, Lia Papa Moŝto Pio X-a. Due al multaj Episkopoj, Ĉefepiskopoj, Kardinaloj kaj aliaj Prelatoj. Trie, al kelkaj eminentuloj, ne pastroj. Ni jam ricevis tre ŝatin-dajn aprobojn de kelkaj membroj de la Episkoparo.

Inter tiuj aproboj ni multe ŝatas la belan kaj kuraĝigan leteron senditan de Lia Eminentia Moŝto, la Kardinalo MERCIER, Ĉefepiskopo de Meĥleno en Belgujo, tial ke tiu mondfama Prelato ne nur donis al niaj Deziresprimoj plenan aprobon, sed li komisiis al sia Help-episkopo kaj Vikario ĝenerala, Monsinjoro DE WACHTER, sciigi al mi, kiel Prezidanto de I. K. U. E., ke li estas preta zorge ekzameni la demandon, kiamaniere oni povus en Belgujo doni al tiuj deziresprimoj *praktikan efikon*.

Ni substrekas tiujn lastajn vortojn, ĉar jen precize tio, kion ni deziras havigi, ne nur en unu eparĥio, aŭ unu lando, sed ĉie en la tuta katolikaro. Sed tiu „praktika efiko”, donota al niaj Deziresprimoj estos nur ebla per la altprotektado kaj agado de la Episkoparo. La tuta forto de nia Esperanta Katolika Movado fondiĝas en nia absoluta kaj humila submetiĝo, ĉiel kaj en ĉio, al la aŭtoritato de la S-ta Seĝo, kaj de la Episkoparo. Kun S-ta Ignacio, la disciplo de la Apostolo S-ta Johano, ni laŭte ekkrias: „Nenion faru sen la Episkopo” kaj kun S-ta Hieronimo: „Se iu estas unuiĝinta al la Seĝo de Petro, mi konsentas kun li”. „Si quis Cathedrae Petri jungitur, meus est.” Do ni devas deziri, kaj penadi por havigi, de multaj Episkopoj similan promeson pri efika kunlaborado. Se ĉiu Episkopo bonvolus sekvi la progreseman decidon de Kardinalo MERCIER, niaj katolikaj kongresoj estus fruktoplenaj por la tuta Eklezio. Rimarku, malpli katolikaj kongresoj pritraktos tiom da diversaj temoj, kiom niaj esperantistaj kongresoj. En la Hago dum „Nia Dua” ni pritraktis kaj formis praktikajn konkludojn pri: La reunuiĝo de la Kristanaro, la protektado de la junulinoj, la defendado de la S-ta Eklezio kontraŭ malvera doktrino kaj kalumnioj, la helpo al la blinduloj, la Pacifismo, kaj la helpo al elmi-gruloj per Esperanto.

Sed, se ni volas eltiri el tiuj ses kunvenoj la maksimumon da profito, ni devos tuj klopodi, ĉie en la mondo, por plenumi la deziresprimojn balotitajn post ĉiu el ili.

Lia Eminentia Kardinala Moŝto MERCIER promesis al ni helpi nin en Belgujo, multaj aliaj Prelatoj, espereble, sekvos tian imitindan ekzemplon, sed unue ni, katolikaj esperantistoj, devas ĉion eble fari por faciligi la episkopan agadon.

Estas nia devo, prezenti al la diversaj Episkopoj skemojn aŭ proponojn pri ĉiu punkto de niaj deziresprimoj kaj sugestii al niaj ekleziaj estroj rimedojn por doni al ili „praktikan efikon”. Al tiu laboro multaj gekatolikoj en diversaj landoj povas partopreni.

Ni povas nur *proponi*; al niaj Sanktaj Patroj en la Episkoparo apartenos la rajto decidi pri niaj proponoj, ilin akcepti, ilin rifuzi, ilin ŝanĝi, k. t. p. Mi do, kiel Prezidanto de la I.K.U.E., admonas kaj petegas ĉiujn gekatolikojn, kiuj opinias ke li aŭ ŝi povus utile proponi rimedon *praktikan* por plenumi iun ajn el niaj deziresprimoj, bonvolu skribi rekte al mi, klare kaj mallonge, klarigante siajn ideojn. Mi proponas poste rezumi tiujn diversajn proponojn kaj peti la diverslandajn membrojn de I.K.U.E. traduki tiun artikolon en siaj naciaj lingvoj, por sendi al la katolikaj ĵurnaloj kaj al la lokaj Episkopoj.

Mi permesas al mi doni la unuan ekzemplon de la speco da proponoj, kiujn mi deziras havigi. Ekzamenu ni la temon de la unua laborkunveno: „La reuniĝo de la Kristanaro”. La konkludo de la konsideroj estas la esprimo de la deziro, ke la tutmondaj katolikoj, sub la gvidado de la S-ta Seĝo kaj de la Episkoparo, klopodu per ĉiu rimedo al ili permesata de la Ekleziaj Aŭtoritatoj por kuraĝigi siajn karajn apartigitajn fratojn, kaj kunlaboru kun ili en tiu tre ŝatinda movado. Ni humile sugestias, ke en la Seminarioj oni instruu la teologiajn studentojn pri la nuna movado favora al unuiĝo, kiu ekzistas en la Anglikana kaj orientaj Eklezioj. Mi tre timas, ke la plej multaj Seminaristoj ekster Anglujo kaj eble Ameriko, preskaŭ tute nenion scias pri tio. Kiom da teologiaj studentoj havas klarajn ideojn pri la diversaj partioj en la Anglikana Eklezio, ekzemple pri la

Societo de S-ta Tomo de Kanteburo? Kiom el ili konas eĉ la nomon de Vladimir Solovjev, kiun kelkaj Katolikoj nomas „la rusa NEWMAN”, kaj lian romaneman movadon en Rusujo? Ĉu ne ankaŭ estus utilege, se ili lernus la diversajn punktojn, kiuj nuntempe apartigas la Kristanojn? La malnovaj fakoj kaj nomoj ne plu sufiĉas. Se ni volas altiri al ni niajn apartigitajn gefratojn, ni devas almenaŭ pruvi al ili, ke ni havas veran scion pri iliaj doktrinoj. Ofte la plej bona rimedo estas nur bone klarigi al ili *niajn* doktrinojn. Ofte ni konstatos, ke ili ne kontraŭstaras la ortodoksan katolikan doktrinon, sed ke nia longa disiĝo kaŭzis malbonan komprenon, ke ni ne plu donas la samon sencon al samaj vortoj. Do unua sugestio: instruo pli profunda pri la nuna teologia stato de niaj ne-katolikaj gefratoj.

Dua sugestio: Ĉu la diversaj teologiaj Revuoj ne povus pli ofte kaj pli *praktike* pritrakti tiujn demandojn; ĉu ni, kiuj per Esperanto havas tiom da interrilatoj internaciaj ne povas kelkfoje sendi al la teologiaj revuoj la rezulton de nia korespondado? Fine, ĉu ni ne povus inviti la pastraron, kaj per la pastraro la fidelulojn, sin interesi pri tiu nobla ideo: la unuiĝo de la tuta Kristanaro por plenumi la deziregon de la Sankta Koro de Jesu: *ke ekzistu nur unu Ŝafejo kaj unu Paŝtisto!*?

Tria sugestio estas: ĉie starigi inter la fervoraj Kristanoj societojn, fratarojn por konstanta propeto por la reunuiĝo de la Kristanaro. La Bona Dio permesis al mi akcepti en la S-ta Eklezio multajn konvertitojn el diversaj landoj. Mi ĉiam rimarkis, ke la vera kaŭzo de tiuj feliĉaj revenoj, ne estis la laboro de iu ajn pastro, sed la multnombraj preĝoj de Katolikaj geamikoj. Do laboru ni, sed precipe ni preĝu.

Jen kelkaj sugestioj pri unu temo; nun mi invitas la legantojn de E. K., precipe la respektindajn Pastrojn ekzameni la aliajn deziresprimojn kaj sugestii al ni rimedojn, kiujn ni kuraĝus submeti al la aprobo de niaj patroj en Kristo, la katolikaj Episkopoj.

AUSTIN RICHARDSON.

LA REUNUIĜA MOVADO EN LA ORIENTO.

Estas kun granda ĝojo, ke ĉiu katoliko konsideras la progreson de Katolikismo en Eŭropo okcidenta, kaj en Nordameriko.

Precipe la mirinda Katolikema movado en la Anglikana Eklezio, kiu havigas al ni tiom da konvertitoj, multaj el ili eminentuloj, tiel kiel la du mond-famaj Kardinaloj NEWMAN kaj MANNING, plenigas je espero niajn korojn. La bela kaj konsolplena parolado de nia kara samideano, S-ro TOVEY, farita en la Hago dum „Nia Dua”, certigis al ni la fakton, ke eĉ en la mezo de la ŝtat-eklezio de Anglujo ekzistas, ne nur individuoj, kiuj firme kredas al la supereco de la S-ta Petra Seĝo „de jure divina”, sed ekzistas ankaŭ Societo, kies celo estas realigi la finan submetiĝon de sia Eklezio al Tiu, de Dio starigita, centro de Unueco. Jes, jen konsolplena fakto, sed la S-ta Romana Eklezio havas aliajn disigitajn infanojn al kiuj ŝi senĉese direktas sian patrinan rigardon: estas la multnombraj milionoj da gefiloj disigitaj de la S-ta Petra Seĝo per la skizmo de post pli ol miljaroj. Tiuj Kristanoj loĝas en Greklando, en Turkujo, en la Danubaj Provincoj, kaj precipe en la grandega Rusa Imperio. La origina kaŭzo de tiu bedaŭrinda skismo estis nur la ambicio de kelkaj estroj ekleziaj, sed precipe registaraj. La popolo, la simpla fidela popolo, ne estis pro tio kulpa, kaj hodiaŭ, nuntempe, la granda plimulto, aŭ nenion scias pri la kaŭzoj de tiu skizmo, aŭ nur scias la malveraĵojn al ili instruitajn de malprava tradicio.

Plue, la plimulto loĝas en lando, kie ne ekzistas vera religia libereco, kie la individua akcepto de la Romana Katolika religio estus tuj punita per la malliberejo, la ekzilo, kaj eble per la mortpuno.

Tamen, ne ekzistas en Oriento la religiaj, dogmaj malfacilaĵoj, kiuj igas la propagandon tiel malfacila ĉe la protestantoj. La anoj de la vulgare nomataj „Ortodoksuloj” konsentas preskaŭ tute kun la Katolikoj pri la Kredo, pri

la Sakramentoj, pri la Hierarkio, pri la kulto al la Di-patrino kaj al Sanktuloj.

Plue, ili posedas veran pastraron, verajn Episkopojn, verajn Pastrojn, ili oferas la veran Oferon de la S-ta Meso, kaj havas la veran realan Apudeston de Kristo, sub la sakramentaj formoj, en siaj preĝejoj. La precipa baro al reunuiĝo estas, ke ili ne akceptas la Die starigitan aŭtoritaton de la S-ta Petra Seĝo, posedatan de la Posteulo de tiu ĉefapostolo: la Roma Pontifiko. En oriento, tiel kiel en okcidento, jen la granda, la unika, esenca demando: „Ĉu la unueco, kiun Kristo anoncis kiel la signon de sia Eklezio, estas certigita per *Die starigita centro?*” Ĉu male, la Eklezio de Dio, tie ĉi sur la tero, havas neniun *Die starigitan centron?*”

Ĉie, tiel en oriento, kiel en okcidento, ĉiu prudenta homo, kiu esploras tiun demandon, ĉu je la vidpunkto de la racio, ĉu je la vidpunkto de la Katolika Tradicio, devas necese alveni al la konkludo, ke tia centro de unueco ekzistas, kaj ke ĝi estas la S-ta Roma Seĝo. Pri tiu punkto la orienta tradicio estas tiel klara, kiel la tradicio de la okcidento. La Sanktaj Patroj unuanime deklaras, kun S-ta Ireneo, en la dua jarcento: „Ad hanc enim Ecclesiam, propter potentiorem principalitatem, necesse est omnem convenire Ecclesiam,” t.e. kun tiu Eklezio (la Roma), pro sia pli potenca ĉefestredo, necese estas, ke ĉiu Eklezio konsentu.*)

Ni do, ne miru, konstatante ke, de post la komenciĝo de la orienta skismo, de tempo al tempo, intervale, ekzistis membroj de tiuj eklezioj, kiuj, pli malpli kuraĝe, konfesis tiun veron, kaj eĉ laboris por ĉesigi la skismon kaj por la reunuiĝo kun la Roma seĝo.

La plej trafa ekzemplo pri tiu intima konvinko de la die starigita estredo de la Roma Seĝo estis la Florenca koncilo (1439) dum kiu la orientaj Episkopoj unuanime konsentis pri tiu punkto, kaj subskribis la „Dekreton” de

*) Por legi la pruvon, ke tio estas la prava signifo, tie ĉi, de la latina vorto „*convenire*”. Vidu „Geschichte der christlichen Kirche” de D-ro DÖLLINGER. Landshut 1833. B. 1. p. 355.

reunuiĝo". Sed, ho ve! ni scias, ke je ilia reveno al la landoj de la orienta Imperio, oni devigis ilin perfidi al ilia promeso, kaj refali en la Skismon. Sed, dank' al Dio, de post la dek-kvina Jarcento, ĝis nia tempo, ni povos rimarki tie ĉi kaj tie, en Rusujo, en Greklando, kaj aliparte Ortodoksulojn, kiuj akre bedaŭras la skismon, kaj konfesas, ke la nura kuracilo estus la reunuiĝo kun la „*Cathedra Petri*". Ekzistas nune, hodiaŭ, prelatoj, pastroj kaj gelaikoj, kiuj sopiras al la reunuiĝo kun la Roma Eklezio. Se tiu movado estas ankoraŭ tre kaŝata kaj tre nekonata en niaj landoj, estas pro la terura persekutado, kiun reformemuloj, aŭ amantoj de la reunuiĝo estus ekscitontaj, se la estroj de la ŝtat-eklezio devus eltrovi pruvojn de iliaj klopodoj.

Ruso ortodoksa, Sinjoro tre altranga ĉe la kortego de la Caro iam konfesis al mi, ke, se en Rusujo ekzistus la sama libereco kiel en Anglujo, oni vidus, ne kelkajn centojn, sed multajn centmilojn, kiuj tuj fariĝus katolikoj, kaj certe antaŭ 50 jaroj la tuta „Ortodoksa" Eklezio reunuiĝus kun la Roma Seĝo.

Pli-malpli baldaŭ tia libereco devos okazi eĉ en Rusujo. Mi envias niajn posteulojn, kiuj tiam vidos la revenon de tiom da perditaj infanoj al la patra hejmo.

Sed, momente ni devas kontentiĝi pri la reveno de kelkaj belaj, sinceraj animoj al la vera Eklezio, kaj esperi, ke ilia ekzemplo alproksimigos la sunleviĝon de tiu pli glora tago.

Libro tre interesa, sed hodiaŭ tre malofta, estas „*Dissertations on the Orthodox or Eastern Communion*" de W. PALMER. M. A. London. Masters. 1853. Kiam S-ro PALMER verkis tiun libron li estis Diakono en la Anglikana Eklezio. Iom pli malfrue li konvertiĝis, kaj restis fervora Katoliko ĝis sia bedaŭrinda morto en Romo, je la 5-a de *Aprilo 1879*. Tiun ĉi libron li do verkis kiel Anglikano, kaj kompreneble ĝi enhavas kelkajn erarojn, tamen la pia aŭtoro ĉiam sopiris al la reunuiĝo de la du Eklezioj. Li estis viro klerega, kaj lertega helenisto, kaj en sia verko li elmontris, ke multaj „ortodoksuloj", estontece, kaj eĉ

estantece, forte malaprobis la malbonan, malaman, sektan agmanieron de la estroj de orientaj eklezioj, kaj konfesis, ke je tiu ĉi vidpunkto la Roma Eklezio estas multe pli prudenta. La plej fanatikaj teologoj grekaj estis la submetuloj al la skisma Patriarko de Konstantinopolo, sed en Greklando, kaj en la Danubaj provincoj ekzistis Pastroj kaj Prelatoj pli interkonsentemaj (consiliants).

Tia prelato estis Demetrio Ĉomatenus, ĉefepiskopo de Bulgario je 1203. Per respondoj de li faritaj al Konstantino Kabasilas, ĉefepiskopo de Dyrraĉium, ni konstatas, ke li konsideris la Katolikojn kiel fratojn, samreligianojn, ke li laŭte bedaŭris la skismon.

S-o PALMER, dum sia longa restado en la oriento, renkontis multajn pacemajn „Ortodoksulojn” kaj instigita de ili, tial ke ili ne kuraĝis agi persone, li verkis petskribon, kiun li prezentis al la S-ta Sinodo de la Rus-ŝtateklezio. Artikolo XXIa de tiu dokumento estas rimarkinda; li proponas: „ke oni starigu en Romo, kunligitajn al la Rusa ambasadoro, unu aŭ du klerajn pastrojn, kies devo estus zorge elstudi la demandojn, kiuj ŝajnas, teologie aŭ politike, esti baroj al la reunuiĝo, kaj samtempe penadi por eltrovi rimedojn por forigi tiujn barojn”. La fina ĉapitro de tiu rimarkinda libro pritraktas la temon pri la devo por ĉiuj kristanoj preĝi ĉiutage por la reunuiĝo de la Kristanaro. Li samtempe esprimas la deziron, ke la Ekleziestroj reciproke kaj oficiale starigu asociojn por tiu sankta celo.

Ni povas aldoni, ke almenaŭ en la Katolika Eklezio, tiaj societoj, benitaj de la S-ta Seĝo ekzistas de post pli ol sesdek jaroj.

Sed, ni havas pli admirindan ekzemplon ankoraŭ de tiu deziro al unueco, en la vivo de tiu pia kaj klera Rusa profesoro VLADIMIR SOLOVJEV, granda filozofo kaj pli granda teologo, kiu naskiĝis je 1853 kaj mortis je 1900. Kvankam li ne publike estis akceptita en la S-ta Katolika Eklezio, tamen post lia morto, liaj biografiistoj, malkaŝe sciigis al la mondo, ke Vladimir SOLOVJEV fariĝis membro de la Sankta Roman-Katolika Eklezio kelkajn jarojn antaŭ sia morto. Lia konvertiĝo estis konata de la Eminentega Epis-

kopo Monsinjoro STROSSMAIJER. Eĉ liaj malamikoj ne dubis pri lia konvertiĝo, ekzemple la apostata pastro GUETTÉE diras pri li: „S-ro SOLOVJEV estas pli papista ol BELLARMINO aŭ ol la Papo mem” *)

Tute ne estas la celo de tiu-ĉi mallonga artikolo priskribi la vivon, kaj ekzameni la multnombrajn verkojn, filozofajn, teologiajn kaj moralajn de tiu klerega profesoro. Tiuj el niaj legantoj, kiuj dezirus ekhavi bonan ideon pri tiu interesa vivo, devus aĉeti la interesan libron: „Un Newman russe, VLADIMIR SOLOVJEV”, par Michel d’Herdigny, Paris, Gabriel Beauchesne & Cie, 117 rue de Rennes, 1911.

Nia celo estas nur konstati, ke la dogmo, kiu altiras al la Katolika Eklezio plejmulte da konvertitoj, estas la dogmo de la supereco kaj la neerarebleco de la S-ta Seĝo.

La tuta teologio Katolika plaĉis al la pia intelekto de VLADIMIR SOLOVJEV, sed la plimulto de tiu teologio similas al tiu de lia nacia Eklezio, sed lia logika animo sentis, unue, ke la Krista Eklezio devas esti *unu*, klare *videbla unu*, kaj due, ke tia unueco estus ne ebla, ne eĉ pens-ebla, sen centro, *die* starigita, por certigi ĉiam, ĝis la fino de la mondo tiun unuecon. Jen la argumento de lia ĉefverko: „La Russie et l’Eglise universelle”. (La Rusujo kaj la Eklezio universala.) La fina konkludo estas, ke la Reĝa estreco de la Roma Pontifiko ne estis uzurpado, sed, male, estis tute leĝa kaj racia disvolviĝo de la rajto donita de Kristo al S-a Petro per la vortoj: „Super tiu ĉi Roko mi starigos mian Eklezion”, „Paŝtu miajn ŝafojn, paŝtu miajn ŝafidojn” kaj fine „firmigu viajn fratojn”.

Tiu argumento estas tiel konvinkanta hodiaŭ, kiel ĝi estis hieraŭ, ĉe la „ortodoksuloj” sinceraj, same kiel ĉe la Anglikanoj; do la supereco de la S-ta Seĝo povas kaj devas esti la interligilo inter la Romemaj Anglikanoj kaj la Romemaj „ortodoksuloj”. Eble nia esperantista katolika movado povos helpi niajn piajn samideanojn, ĝis nun disigitajn de videbla unuiĝo kun ni, uzadi la internacian lingvon por interrilati reciproke, ekzemple Anglikanojn kun

*) „La Russie et son Eglise”, par l’Abbé V. Guettée, Paris. p. 33.

Grekoj, por fondi societojn, kies celo estos certigi, aŭ almenaŭ alproksimigi, la finan unuecon per la reveno de ĉiuj Kristanoj al la firma bazo de tiu ŝtonego, de tiu roko, sur kiu Kristo konstruis Sian Eklezion: „Super hanc petram edificabo Ecclesiam meam”.

AUSTIN RICHARDSON.

UNU · ŜAFEJO KAJ UNU PAŜTANTO.

Joh. X. 16.

Preĝado ke ĉiuj estu unu, ne povos resti sen respondo de Dio.

(Vidu Esp. Kat. Junio '11 pri la Psalmenbund).

Inter la deziresprimoj plej glorigintaj „*Nian Duan*” kaj plej ĝojigontaj nian plej amatan Patron, Pion X-an, sendube la reunuiĝo de la Kristanaro meritas la kronon.

Kiel konsoliganta estas por ni, Katolikoj de la unu vera Eklezio, kiuj ĉiutage, ho ve! devas sperti, ke en niaj katolikaj landoj oni atakas nian kredon, ke oni festmemorigas senhonteme la plej maljustegan rabon al la papaj rajtoj, kaj jam kriegas: „For la Kredo, écrasons l'infâme, morto al la Roma Eklezio” — kiel korgojiganta kaj samtempe miriga, ke nune fratoj de ni disiĝintaj, petegas por reveni, por submetiĝi al detronigita Reĝo, al griza Maljunulo, kies krono estas forrabita, al Malliberulo, kiu ne havas por vivi se ne per la almozoj al Li donacitaj. Kialo de reveno certe nur povas esti, ke dirita Maljunulo estas la konfesanto de Kristo. Ho! nobla, ja heroika estis la agado de S-ro Tovey el Londono, kiu nome je siaj samreligianoj venis Hagon kaj petegis la kunhelpon de l' Katolikoj Esperantistaj por sia plej necesa afero: reveni en la unu ŝafejon, sub la unu Paŝtanta. La Dio Ĉiu-bona benadu tiun noblan P-ron kaj liajn sekvulojn, donaconte al ili la gracon de baldaŭega plena konvertiĝo. Sed, krom la Anglikanojn, ni havas ankoraŭ milionojn da gefratoj, kiuj eraras malproksime en

Oriento, foririnte de la ĝusta, mallarĝa, — por sekvi la larĝan vojon, kiu kondukas al perdiĝo. Ankaŭ ilin ni volas kuragi, laŭ deziresprimo de „*Nia Dua*”, kaj kun ili kunlabori por ebligi ilian videblan komunion kun la S-ta Seĝo (cathedra Petri), ĉar ankaŭ ili estas niaj gefratoj, kreitaj por la ĉielo, ankaŭ por ili reaĉetotaj, iam fluegis la Dia sango sur malmolega krucoligno Golgota.

Nu, kiel bela okazo prezentiĝas al ni (vidu „*De Tijd*”. 23. 8. '11, art^o. de D-ro MULDER, S. J. pri la tria Kongreso de Velehrad), ĉar, (27, 28, 29 Julio) haviĝis jam 3a Kongreso internacia, peninta atingi saman celon, — prezidis Mons-ro BAUER, Princ-Ĉefepiskopo de Olmütz kaj Mon-ro CHANOFF, Ĉefepiskopo de Tessaloniko. — El ĉiuj flankoj: Galicio, Romo, Italujo, Franclando, Germanujo, el ĉiuj landoj de l' Aŭstri-Hungarujo k.t.p. oni alvenis, kaj tre interesaj estis kunvenoj kaj paroladoj.

Mi raportas nur historion de iu infano el Bulgaraj gepatroj en Andrinopel naskita, kiu malgraŭ sia edukado en la skismo, treege deziris la ĉiu-tagan komuniĝon. Sed ho ve! la skismo tiun ne permesas. La infano, poste fariĝinta religiulo, ĉiam estas persekutita pro sia pieco por la Sanktega Sakramento ĝis al fino, jam 70 jara, kun 400 anoj li forlasis la skismon por eniri en la Roman Eklezion, la veran ŝafejon. Ho! kiom da gefratoj eble atendas nian manon por ke ni ilin konduku el sensuka dezerto en la ĉiam-freŝan Paŝtejon, ĉe la nesekiĝeblan fonton de ĉiam vivanta akvo, por ke ni ebligu al ili laŭ deziro satiĝi al la ĉieldolĉaj festenoj, kiam Dio mem sin donacas kiel nutraĵon kaj trinkaĵon.

Mi tradukas nun la finon de l' art. de P-ro MULDER: „Eble dependas de l' zelo de ni, okcidentuloj, ĉu la maldormiĝanta Oriento estos katolika aŭ pagana. Ni ankoraŭ tion-ĉi pripensu: la barilo, kiu malhelpas la en-amason revenon de l' Anglujo, ne estas konata en la Oriento — tie-ĉi oni havas pastraron valide konsakritan. Donu Dio, ke la stimulo de Velehrada Kongreso alvenu ankaŭ ĝis al ni, instigonta niajn pastrejn oftege memoriĝi niajn mizerajn gefratojn apartiĝintajn, dum la Eŭkaristia Ofero, —

kaj niajn kredulojn ofte por dirita intenco oferdoni la S-tan Komuniĝon „*ut fiat unum ovile et unus Pastor*”, por ke fariĝu unu ŝafejo kaj unu Paŝtato.”

Ĉu „*Nia Tria*” en Budapeŝto ne povus esti de la dia Providenco elektita ilo por efektivigi diritan planon diindan!

Ĉu la simpatia, Hungara Prelato, Mons-ro GIESSWEIN, kiu forirante el la Haga Kongreso, ekkriis plena je entuziasmo: „*ĝis revido, al Budapeŝto, alvenu kaj vidu*”, ne povus esti taŭga instrumento en la mano de l’ Dio Ĉiu-pova, por plenumi en Oriento la planon de P-ro TOVEY, tiel laŭdinde dum „*Nia Dua*” projektitan! Tion donu Dio!

Ni do ankaŭ nun, atentu kaj ĉeestu senprokraste, kiel ni faris por la jam sukceson havanta Kredapologio, de P-ro DOWLING iniciative proponitan.

Ni tuj proponu nian humilan kunlaboron al niaj Orientaj Fratoj. Ni konatigu nin, ni amikigu nin, ni amikiĝu kun ili, ni praktike plenumu nian devizon: „*Katolikismo per Esperanto*”. Ni ekkaptu kaj utiligu ankaŭ ĉi-tiun okazon, por pruvi la rajton de nia movado, la valoron de nia ekzisto.

A. M. D. G.

(P-ro SEVERYNS, O. S. Kr.)
S-ta Agato, (Nederlando).

La Latina Lingvo Eklezia por Laikoj.

Precipe de post la Reformacio ni sentas la malhelpaĵon, ke la Eklezio kaj ĝia popolo lingve diferencas.

Ni ja estas Romaj Katolikoj, tamen ne Rom’anoj.

Verdire, jam en la katakomboj la unueco ne estis absoluta, ĉar Romo tiam uzadis ĉefparte la Grekan lingvon. Tion memorigas ankoraŭ la alfabeto, kiun, ĉe preĝej-konsakrado, la episkopo skribas sur la tero en ambaŭ la ĉeflingvoj de l’ Antikveco. Sed, la Latina lingvo estas kaj restados la Eklezia lingvo, ankaŭ por Germanoj, por ni

„Barbaroj, samtempe civilizitaj kaj konvertitaj en „*nomine Patris et Filii et Spiritus Sancti*”.

Taŭgaj motivoj stimulas nin konservi tiun heredaĵon. Nia tempo de interrilatigo, kiu por kongresoj ankaŭ esperas tutmond-lingvon, komprenas la malnovan postulon al internacia lingvo por nia internacia religio, per kies potenco fremdulo ĉie sin scias hejme inter siaj surgenuaj fratoj kaj la eterna brevier-koncerto daŭre harmonias. Kontraste al la turo Babel'a, la ŝtonego de Romo estas nomata: bonfara signo de reamikiĝo por la dividita homaro. La lingvo latina estas lingvo mortinta, sed, diras DE MAISTRE: „la unika lingvo mortinta, kiu reviviĝis kaj imitas la Majstron, kiu unufojon reviviĝinte, neniam plu mortas”. La vivpleneco de la Eklezio mem en ĝin transplantigis: la katolika aŭ universala Eklezio havas la idealan tutmond-lingvon. La surskribaĵo sur la kruco, trioble skribita Hebree, Greke kaj Latine, jam antaŭdiris la trioblan karakteron de la fruktoriga Patrin-Eklezio: Orientan Poezion, Helenan saĝecon kaj Rom'anaran forton. Vere, al ĉi-tiu mondlingvo tuta la mondo kontribuis, ankaŭ la posteaj generacioj: Keltoj kaj Germanoj kaj Slavoj, ĉiuj alportis siajn talentojn kiel oferojn al la ĉefurbo, al la Eterna Urbo, kiu absorbas ĉiun movadon.

La kulto, kiel faktoro de la tradicio, postulas plenkreskan lingvon, pro tio ke la modernaj lingvoj kun sia variema vortriĉeco ne sufiĉe senŝanĝe difinas la dogmajn terminojn, sed aŭ devas ilin renovigi ree kaj ree, aŭ ilin nekompreneblajn, transdoni al mokado.

La objektiveco de la „*opus operatum*” inde esprimiĝas en la ceremonia rito, kiu estas plena je abstraktaj formuloj. Tia pura riĉeco de ideoj tiele kristaliĝis en ĉiuj tiuj arĥaikaj formoj, ke la plej malforta tuŝeto kun la temp Spiro ŝajnas sakrilegio. La sankteco devas esti vualita kontraŭ la profanado de la mondo; la strangeca-mem de ĉi tiu eklezia lingvo imponas tie, kie respekto balbutas: „*Terribilis est locus iste, hic domus Dei est et porta coeli*”.

Same kiel sian propran vestaĵon la pastro demetas sian gepatran lingvon por la Sanktaj Agadoj. Ŝajne li sin apartigu per tio de sia popolo, — tamen li supreniras la ŝtupojn

de l' altaro kiel peranto inter ĉielo kaj tero, ne por paroligi nur la voĉon de sia koro, sed la voĉon de la poliglota komunumo, la de Kristo vivanta korpo. Jam de l' antikveco la herezuloj kontraŭbatalas la Latinan lingvon kiel signon de la unueco kaj kiel eternigitan Pentekost-miraklon, kiu etendas la „*depositum fidei*” super lokaj diferencoj, kiel unu blanka velo super tuta la de Petro ŝipo. „*Lex orandi est lex credendi*”.

Teorie do neŝanceble firmaj, ni volas vidi realigita la mistikan interrilaton inter pastrar-ĥorejo kaj navo. La mezcentjaroj senceremonie dividis la kredantaron en du kategorioj: unuflanke la pastroj aŭ religiaj skribistoj, havantaj la tonsuron *sur*, — kaj la librojn *en* sia kapo, aliflanke laikoj aŭ ne-instruituloj, kiujn nia dirmaniero ĉiam ankoraŭ identigas. La diferenco estis almontrita de la preĝeja apartigo: nome de la ĥorej-barilpordo, kiu forŝosis la „Sanktejon de l' Sanktuloj”, postrestaĵon de la muro aŭ kurteno templa, malantaŭ kiu la Oriento Eklezio kaŝadas la misterojn, kvazaŭ la neniel esotera doktrino de l' kruco ne devas esti predikata „*al ĉiu ajn kreitaĵo*”. Eĉ ne estis permesite traduki la kanonon de la meso, ĉiam ankoraŭ mistere paroletatan. Tion fakte certigas al ni, krom la historia verko de Adolf FRANZ, la Beŭron'a Schott, kiu, laŭ la ekzemplo de Dom GUÉRANGER, dum tuta sia vivo ĝis la finiĝo de la 19a jarcento rifuzadis traduki la Kanonon en sia bela „*Mezbuch*” (Misalo).

Ĉar nuntempe ĉiu ajn ja scias legi, tia sekretigo plu ne estas ebla. Ne nur malaperis la sociaj privilegioj kaj la scienca monopolo de la pastraro, sed iom post iom ree pli intimiĝis ĥorejo kaj popolo, kies kunigon formas la „Tablo de l' Sinjoro”. Efektive, la Eŭkaristio estas la esenco de nia problemo. De post la tempo, kiam oni ne eksklusive tenis kaŝata la „Plej Sankta Sakramento” malantaŭ tabernaklo-pordoj, sed Ĝin procesie rondiren portis kaj Ĝin poradore elmetadis dum la „Laŭdo”, precipe de post la kvardekhora preĝado, la ĉiam-daŭranta adorado kaj la denove-moderna ĉiutaga komuniĝo — laŭlonge de ĉi tiu evolucio-linio la distanco inter enirejo kaj altaro

senteble plimallongiĝis, kaj pli intimiĝis la „interkomuniĝo de l' Sanktuloj”. La preĝej-konstruado travivis evolucion de kripto ĝis kupolo, de long-navo ĝis centra-konstruo.

En ni tiamaniere plenumiĝis la enkarniĝo de la Divorto, (Verbum Dei): la Sinjoro fariĝis Patro, Frato, Fianĉo. „Ne ekzistas alia popolo tiel granda, havante siajn Diojn tiom proksimaj al si, kiel nia Dio ĉe ĉiuj niaj preĝoj”.

Cetere, ankaŭ ĉi tie la rezultatoj de l' popularigado ne estas nepre progresaj. Kion oni gajnis per larĝeco, per pli ofta partopreno al la „Sanktaj Agadoj”, tion oni perdis en profundeco, en la kunsentado kun la animlingvo de l' Eklezio, kun la „*liturgia*”, por fine elparoli la kriterian vorton.

Aŭ, ĉu kongregacio ne multe pli estas vizitata ol la Vesperoj, kiuj plej ofte estas eĉ malstarigitaj? Certe, nia tempo havas praktikajn profitojn: la prediko kunkreskis kun la Dimanĉa Meso, la preĝado estas aranĝita en kunaj ekzercoj, kiel litanioj kaj krucvojo, same kiel niaj genuflekslokoj en vicoj da benkoj; la katekismo estas multobligata per apologio; periode Jezuitoj, Kapucenoj, Redemptorenoj aranĝas rejtratojn (religiajn izoliĝojn). Ni, nuntempe plenaj je organizado kaj refoje organizado, dankeme konfesas, ke de post Trente la organizado de la Eklezio treege evoluadis.

Preĝlibroj en la gepatra lingvo, enhavantaj aplikeblajn preĝojn kaj kantojn por ĉiuj cirkonstancoj, kontentigas la amason; la brevierhoroj estas simpligitaj kaj popularigitaj en la Anĝeluso.

Sed , ĉu pro la rozario, tiu sankta animritmo, kun ĝia trioble kvindek „*Ave Maria*” baptnomita „*psalmaro de Maria*”, ĉu pro ĝi oni ne tromulte forgesas la cent kvindek psalmojn de la Sankta Skribo? Ja, la infanoj jam scias distingi inter planedoj kaj kometoj, tamen nur kelkaj plenaĝuloj observas la eterne rulanton stelar-ĉielon de l' Eklezia jaro. Preskaŭ malsaĝa ŝajnas laiko, posedanta brevieron, pli malsaĝa ankoraŭ, kiu ĝin uzadas. Kaj tamen ni scias, ke Biblio kaj Breviero, tiuj inspiro-riĉaj verkoj, la Dia vorto kaj la Eklezia lingvo, tiele proporcias al niaj

plej belaj preĝoj, kiele voĉo el ĉielo al tera muziko. Do, ke la soloj de privataj devocioj kunfandiĝu en la sociala liturgio! Domage, nia popolo de timidaj silentuloj kaj de obstina apartiĝo, ĉiam ankoraŭ tiom malproksimiĝis de la kuna gregoria muziko, la idealo de nia liturgio-amanta papo, la realigita idealo inter psalmo-kantantaj Reformacianoj!

Nederlando havas duoblan senkulpiĝon. Unueloke — kontraste al la episkopala, treege liturgia Anglujo — en nia patrujo la Krist-tradicio perforte estas interrompita. Evidentan pruvon pri ĉi tio havigas al ni la preĝejo, „*Nia Sinjoro sur Subtegmenta Loko*”, tre apuda de la „*Malnova Preĝejo*” en Amsterdam. Pli skandalonan pruvon liveras al ni la „*Begin'ar'ejo*”, kie la en la mezo staranta preĝejo apartenas al eksterlande-loĝantaj Protestantoj, kio devigis nin ie alie aranĝi privatan domon kiel „*sanktejon*”. Sed, plej skandalona pruvo estas sendube, ke nek artista, nek historia respekto detenis tiujn civilizitajn Vandalojn forŝteli al ni la „*Nieuwe Zijdsche Kapel*”, nian „*Sanktan Sidejon*” (nian plej amatan preĝejon). Katolika Nederlando pli kutimiĝis preĝej-iri en privataj domoj ol en preĝejoj. Premegita per „*oficialaj plakardoj*”, oni forgesis la piajn kutimojn, esceptinte la societeman „*Sankt Nikolao*”-feston; la Reformacianoj preferis la civilan antaŭ-nov-jar-vesperon kun malbonodora pied-fajrkesteto pli ol la anĝelan Kristnask-nokton kun ĝiaj incens-odoroj. La Sanktulnomoj de niaj stratoj ne plu korgojigas nin per la dolĉa „*Sankt*”; nia religio forŝiriĝis el siaj radikoj en la nacia vivo, pro tio ĝiaj suktoj ne plu trapenetras la societon; ni tute forgesas niajn patrujajn Sanktulojn. Niaj preĝejoj nune nomiĝas laŭ la strato, ne, laŭ la strateto, kie dum la persekutado niaj fideluloj sekrete enŝteliris la malantaŭflankon de la preĝejoj. La monaĥejoj kun sia ĥorejpreĝado tag-nokta estis forbruligitaj, kaj nur antaŭ nelonge la malnovaj ordenoj elvekiĝis, inter kiuj la plej malnova, tiu de Sankta Benedikto, ŝajnis esti tute formortinta. Arte ni greftas nian kulturon sur la florintaj mezcentjaroj.

Ĉar, dua senkulpiĝo troviĝas en la estanteco, ne en tio,

kion aliaj ruinigis, sed kion ni mem rekonstruas. Feliĉe ni povas konstati reviviĝon. Nune, ni ree sekvas la riton de pli proksime, nune ni ree iniciiĝas en la simboliko, kiu dum centjaroj kuŝadis kaŝita sub la reformacia kalk-peniko; nune ni vidas Sanktan Cecilion sin levanta el ŝia tombo.

La infano juda respondos al via demando, ĉu ĝi lernas la hebrean lingvon: „Kompreneble, jes!“. Por la judo la hebrea lingvo estas krom „lingvo de Jahve“, ankaŭ tiu de la elektita popolo, de la nacio; la Zionismo same kiel la Israelida atendado al Mesio primeloke estas politiko. Jen dua ekzemplo, kiu ankoraŭ pli hontigas nin! La diletant-Budisto kaj modo-teozofa superŝutas vin per terminoj el la Sanskrita Lingvo, ĉar Hindujo estas ilia religia patrujo. **Sed la Rom—Katolikoj, multe pli firme alligitaj al Romo, preskaŭ ne komprenas la preĝojn de la S-ta Meso! !** Oni deziras esti nomata: instruita Katoliko, sed kiel katoliko oni ne estas instruitulo. Oni forgesas, ke ĉiuj energioj sin devas turni al la sama celo, al la „prima kaj plej sankta ordono“:

„Amu Dion, la Sinjoron, el tuta via koro, el tuta via animo, el tuta via intelekto, el ĉiuj viaj fortoj.“

Necese estas, trapenetri ĝis la koro de nia religio, ĝis la fonto de nia pieco. Ni, kiuj envias la simplanimulojn pro ilia naiva preĝarto, sed kiuj, ne mensogante, ne scias imiti ilian infanan babiladon, ni trovas en la eklezia lingvo la vivantan organon de la Dia Vorto.

Du direktoj kondukas al renkontiĝo de Eklezio kaj popolo, kaj ambaŭ estu samtempe sekvataj!

Sin mem rekomendas tradukado de la Sanktaj Tekstoj, kiun la Leuven'aj Benediktenoj, laŭ deziro de la meĥlena kongreso, plejeble favoras. Mi kuraĝas ĉi tie pledi: *ĝeneralan studadon de la Meso-latina lingvo.*

Ĉu do la latina lingvo interdiferencas en preĝejo kaj lernejo? La de la renesanco pedanta malestimo, nenion pli glorigante ol sian elegantan frazkonstruon, rilate al la mezcentjaraj verkistoj pri tio liveras konvinkan pruvon. Lingvo kaj literaturo vere interdiferencas. En la mez-epoko la latina lingvo ne tute estis mortinta, sed ĝi pliriĉiĝis kaj

regule ĉaliformiĝis per simpliĝado kaj alkonformiĝado al la popol-lingvoj. En episkopa kolegio min pastroj instruis ankoraŭ pri la malplivaloreco de tiu „monaĥo-latina-lingvo”; kvankam poste, en akademio, mi aŭdis de miaj profesoroj, ke lingvo nepre ne malplivaloras, se ĝi nature evoluadas. Klarege oni elmontris tion al mi per la historio de la eklezia lingvo latina. Niaj knaboj restadas tiel same pedantaj koncerne la Sanktan Skribon, kiel S-ta Aŭgustinus antaŭ sia konvertiĝo.

Nun kiam mezjarcentoj kaj renesanco sufiĉe malproksimiĝis post ni, por senpartie kompari ilin, nun la sintendo de la humanisto ŝajnas al ni malgrandeca pro vantemo, limigita pro formo-adorado. Pri tio ni trovas la pruvojn ne nur ĉe la nepraj paganuloj (inter kiuj la malreputacia Kardinalo Bembo, kiu ne preĝis brevieron, timante malbonigi sian stilon), sed ankaŭ inter la plej ortodoksaj rondoj en la Eklezio. Jam tutan jarcenton la kristanaj humanistoj indigniĝis pri la antikvaj himnoj, ja plenplenaj de eraroj kontraŭ la klasika ritmo! Fine Urbanus VIIIa ilin revizigis de komisiono el Jezuitoj, kvankam ĉi tiuj nemuzikemaj scienculoj kompreneble malmulte ŝatis tiujn simplajn kantojn. Feliĉe, la miljara Eklezio al la temp-spirito donis rajton ĝian, ne malkonfesante sian propran esencon; Ĝia konservema forto ĉefparte subtenis la tradicion propiece. Krom la monaĥ-ordenoj de antikva nobleco, kiel i. e. la Benediktenoj, kiuj konservadis la originalajn tekstojn, ankaŭ la Jezuitoj, sen mezepoka tradicio kaj komuna oficio, kiom eble malplej ŝanĝis la heredaĵon de la Eklezio; ĉiam ankoraŭ tro multe; pro tio unuj, ĉe l' venonta revizado de la breviero, deziras restarigi la originalajn tekstojn, kies profunda senco ebeniĝis per la glata ritmo.

Mezjarcentan poeziaĵon ĉiu ajn povas legi unuavide; la vortoj en si mem portas la poezion. Kontraŭe, la deĉifrado de antikva versaĵo kun ĝia komplika prozodio postulas seriozan pristudadon. Himno de Ambrosius estas popol-poeziaĵo, odo de Horatius salon-artaĵo: ili proporcias kiel la „vero” al la „falso”; tiale la Sanktulo daŭre inspiras niajn poetojn, eĉ la plej profanajn — la paganulo fariĝis mono-

polo de libro-scienculoj. Teknike, la diferenco kuŝas en la mezuro: antikva versaĵo estas *metrika*, mezurita, nombre kalkulita laŭ la litero; mezjarcenta versaĵo estas *ritma*, pesita, regulita laŭ la sono. La afekta metrikaĵo nefacile estas muzikigebla; la vigla ritmo, kiun ni senkonscie sentas en nia pulsbato, — kiun ni realigas en ĉiuj movadoj kiel: kurado, dancado, laborado' — *tiu* ritmo estas organa, natura muziko. Se ni plie pripensu, ke la antikvuloj **ne** uzis rimon, kaj **jes** la mezepokuloj, ni vidos realigita en la belsonaj ekleziaj himnoj la modernan teorion de „Verlaine”:

De la musique avant toute chose! (Antaŭ ĉio: muziko!)

Ankaŭ lingve la Eklezi-lingvo ne estas sklavo de la klasikeco, kiu preskaŭ ne meritas la nomon de lingvo, ĉar nur mallonge ĝi vivis sub Aŭgusto, kaj nur arte en eta rondo de aŭtoroj. Ĝi estas la libera heredanto de la *popol-lingvo*, multe interdiferencante kun la *korteg-lingvo*; ĝi multe pli facile moviĝis, kaj precize pro tio estus malestimota de la skolaj humanistoj. Kiel popol-lingvo ankaŭ nur la Eklezia latina lingvo povis esti univcrsala kaj senmorta.

Eĉ Kvintiliano mem, tiu modelo de la gramatiko, bedaŭris la mallarĝecon de la klasikuloj kaj deziris pli grandan liberecon ĉe l' vortfarado. Tiun liberecon uzadis la kristanismo, kiu por sia nova spirito alportis novajn vortojn, kaj kiu sciis doni al la lingvo de la Leĝo spiritan kaj supernaturan enhavon per sia graĉovivo. La bibliaj lingvoj, unueloke la metaforriĉa hebrea lingvo, pliriĉigis la latinan, — precipe per la influo de S-ta Hieronymus kun lia Vulgato (jam la nomo esprimas la popularecon de lia traduko de la S-ta Skribo) kaj per lia redakto de la preĝ-formuloj, kiuj faras tiun Eklezio-patron patro de la Eklezia lingvo. Plie, Afrikaj verkistoj, kiel Tertuliano kaj Cipriano, enkondukis dialekt-formojn en la de Romo lingvon, destinitan „*urbi et orbi*”, kaj sufiĉe ekspansia por samtempe allasi propran stilon al la papa kancelario, kaj al skolastikaj universitatoj, kaj... al humanista beletristik'aĉo kun ĝia skrupula purismo.

La renesanco ne jam ĝis fine elfuriozis, la dogmo de la

„klasikismo” ĉiam ankoraŭ postefikadas. Kiel historia aperigo, la humanismo facile estas klarigebla kaj ŝatinda, ĉar la dekadencaj mezcentjaroj estris la arton kiel preĝejpedelo, kaj igis la preĝejon preskaŭ malliberejo. Sed ĉi tiun tiranecon venĝis alia ekstremo.

La plendo de alipensula gimnazio-rektoro, kiu, nur kiel pedagogo, konstatis, ke la por nia civilizacio multe pli riĉa biblia historio, multe malpli estas pristudata ol la antikva mitologio, elvokis fortan vokon tra tuta la katolikaro.

Se ĉi tiu vorto alkondukos agon, tiam estos bezone, ke multo estu reformita en nia instruado. La klasika filologio, tiu gloro de l' gimnazia-urbo „Leiden”, sin mem detronigis, disrompinte la aŭreolon de siaj Romaj herooj. Mommsen donis la ekzemplon kaj senmaskigis Ciceronon; la humanistoj, tute seneraraj kontraŭ gramatiko-reguloj, pruvis, kiel veraj bastardoj, eĉ ne posedi propran katakteron kaj propran stilon. S-ro de Klerk en lekciaj por la anoj de la societo „de Violier”, klare tion almontris per la du Nederlandanoj ERASMUS kaj TOMASO DE KEMPEN: la akademia latin-lingvo, al si mem promesante senmortecon, mortiĝis, kaj la enterigita Eklezia lingvo reviviĝas. Ja, la estetika kritikisto trovas la Imitado'n kun ĝia kvieta ritmo kaj duon-kaŝitaj rimoj, mi ne diras pli *bona*, sed pli *bela* ol la „Laŭdo'n al la Malsaĝeco” kun ĉiu ĝia genio, kun ĉiuj ĝiaj superŝarĝitaj periodoj. KLOOS, klasika literaturisto kaj konscia paganulo, tradukas la „Imitado'n” kiel ĉefverkon.

Sed, la defendo de la Eklezia lingvo latina en si mem estas tiom racia, ke ni ne bezonas forte kontraŭbatali la lernej-latin-lingvon. Antaŭ kvindek jaroj, du francaj prelatoj, Monsinjoroj GAUME kaj DUPANLOUP, en granda polemiko atakis kaj defendis la klasikan edukadon. Ĉi tiu problemo ne apartenas al nia temo, ĝi tial ne distrigu nin de la esenca demando. Ĉiujn plendmotivojn kontraŭ la nemoraleco de la klasikuloj ni metu flanken, ni nur konstatu la nesufiĉecon de nura klasiko edukado. Kiel lernejo la gimnazio restadu neatakita, se ni nur ne forgesu, ke ĝi ne estas pli ol lernejo. La studado pri la antikvaj verkistoj

estu preparo al la studado pri niaj propraj majstroj, eklezio-patroj, mistikuloj, skolastikuloj, car en ilia saniga atmosfero ni bezonas spiradi, se ni kune deziras krei modernan monumenton de kristana arto.

Antaŭ ne longe la historiisto GODEFROY KURTH pripledis tute sola, kontraŭ la Mehlena kongresistaro, la superecon de l' eklezia lingvo super la lernej-latina lingvo por niaj katolikaj kolegioj. Lia parolo perdiĝis tiame; malgraŭ ĉio ĝi resonados, kiel eĥado de MONTALAMBERT, VEUILLOT kaj Donoso CORTES, ĝis kiam lia deziro fariĝos realeco.

Jen fine, la pastro finis sian dek-unu aŭ dek-dujaran seminario-studadon; tamen li, kvazaŭ fremdula, ne ekkonas la poezion de siaj ĉiutagaj preĝoj, (ni neniel priparolu la patrologion!); Virgilion li scias parkere, Prudention li neniam lernis legi. Se tia estas la „verda ligno”, kiaj ni povas esti, ni laikoj?

Se ni principe interkonsentas, ke la instruituloj ne forgesu la latinan lingvon inter la multaj lingvoj nuntempe lernotaj, tiam restas la praktika demando, kiele ĉi tion efektivigi?

Unuavide tio ŝajnas ne efektigebla postulo; ĉar oni kutimiĝas rigardi nur la seminarion kiel edukejon. La preparig-seminarieto ankoraŭ pli fortimigas per sia superregado de antikvaj lingvoj; ĉar ĉiam ankoraŭ ekzistas kelkaj (aŭ ekzistis ĝis antaŭ nelonge) kie dum du tutaj horoj ĉiutage — prefere senpaŭze — la latina lingvo estis instruata. La rezultato de tia rigora studado?: memverkitaj, metrikaj versaĵoj, laŭ multego da modeloj, kaj fine Ciceronia parolado, tute regula, konstruita laŭ la sintakso, nur taŭga por fremdigi filozofojn de ĉia skolastikeco kaj artamantojn de ĉiu klasikeco. La kaŭzo de ĉio ĉi tio estas la tirana grammatiko, kiu malaltigas komprenadon kaj ĝuadon ĝis memorado. Sed la gimnazio perdas jam troon da tempo per la latina lingvo: meze ses horojn dumsemajne, kio — la jaro taksita je 40 laborsemajnoj kaj multiplikita per 6 studo-jaroj — faras preskaŭ 1500 horojn, neenkalkulitaj ankoraŭ tiom da multvaloraj horoj, dum kiuj oni hejme ĝisŝvite studadas kaj faras ekzercojn.

Kaj verki latine, estintece unua postulo por bona edukado — ĝis antaŭ nelonge ĉiuj akademiaj disertacioj estis verkitaj latine! — pri tio oni eĉ ne pensas plu, kvazaŭ tiu talento tute perdiĝis. La postuloj de l' laborprogramo estis ja multe tro altaj, kaj (ĉe l' neevitebla plimultiĝo de la lernotaĵoj per natur-scienco kaj modernaj lingvoj) tro ekskluzivaj, partiaj. Ni kontentiĝu *legi* latine, la *verkadon* ni lasu al la scienculoj kaj al la Romanaj gentoj. Sed, restas la neĝusta opinio, ke la lernado de la latina lingvo postulas malpleje ses jarojn - en Germanujo eĉ naŭ jarojn. Esperdona estas la perspektivo, kiun malfermas la „*enĉenerigakomisiono*”, kiu opinias la tri lastojn gimnazio-jarojn sufiĉaj por klasika edukado; tiele ĉiu rememorigo al la malnova „Latina Lernejo” kun ĝia Latino Lingvo kiel solsaviga doktrino malaperas.

Tiun estontecan programon jam realigas la „Haga” Liceo, primaloke bone instruante al siaj lernantoj la Nederlandan kaj fremdajn lingvojn, kiel enkondukon en la latina lingvo; mi, ja iame ĝin devis ekstudadi, neniam aŭdinte pri kazoj!! Kiale la gimnazio, obstine kaj malnoveme preferus la historian vicordon pli ol la metodan, nun kiam la universitato, pristudante la evoluadon de la lingvoj unu el la alia, praktike inversigas tiun vicordon, kaj kiam filologo lernas la nov-gotan lingvon antaŭ la pra-sanskritan?

La eklezia lingvo latina, laŭ sia naturo estas lernota kiel speco de moderna lingvo, malplejeble skole. *Mi* nek intencas, nek povoscias reformadi la instruad-sistemon; provizore mi penadas interesigi la plenaĝulojn, ĉar novaĵoj ĉiam influas inversen kaj atingas la infanojn nur per la pliaĝuloj.

Kiel lerniloj, du simplaj verkoj, vortaro kaj gramatiko, estas verkataj. Samtempe tro multe kaj tro malmute donas klasika leksikono, kiajn mi en mia juneco ĉiutage devis konsulti (traserĉi), vere ne ĉiam je mia edifo. Per nura *forigo de nebezonaĵaj vortoj*, precipe de propraj nomoj, la laboro eĉ ne duone estas preta; ne nur negative, sed ankaŭ pozitive oni laboru: multaj novaj vortoj estu aldonotaj! Ĉar konkordanco de la „Vulgato” ja enhavas sennombrajn vortojn ne troveblajn en lernolibro; kaj nenion ankoraŭ

mi diris pri la eklezio-patroj kaj mezcentjaruloj kun tia propra idiomo, ke ĝi necesigis eldonadon de speciala vortareto nur por la geografiaj nomoj, troviĝantaj en la Breviero.

La de „Du Cange” dek pezaj volumoj pri l’ mezjarcent-latina glosaro, kaj multaj katolikaj enciklopedioj, enhavantaj abundon da teologiaj kaj ekleziaj terminoj, havigas al ni trezoron de „*Katolikaj vortoj*”, nenie en kiu ajn „*Nachschlagebuch*” (Vademecum) kunigitaj.

La dua verketo estas inicilo al la pristudo pri la eklezia lingvo latina. Ĝi sisteme kunigas la ĉefaĵojn por ebligi facilan retrovon de iu ajn formo kaj la regulan konsultadon, sed antaŭ ĉio ĝi devas esti sugestia. Anstataŭ fari al la lernanto lian taskon kiom eble plej malfacila per mult-ampleksa libro kun senfinaj serioj da esceptoj kaj ĉiuspecaj maloftaĵoj aŭ preskaŭ-neniamaĵoj, tia verketo forĵetos ĉiun superfluan balaston, klarigos la regulojn per trafaj ekzemploj. La orelo de l’ kredanto plena estas je karaj sonoj, kies sencon li jam duone komprenas. Nun estas dezirinde, vidigi al li kiom li jam scias. Ekzemple: ĉiu kredanto scias per la sanktulnomoj, ke vortoj, finiĝantaj per „a” estas virin-seksaj, kaj mesoservanto supozas, ke Sankta Bonaventura estas virino, ĝis kiam li vidas lin pentrita kun lia rûĝa ĉapelo. La „*Ave Maria*” rememorigas lin pri lia nekonscia scio de la deklinacio, „*Pater Noster*” pri la konjugacio. La Triunuo elmontriĝas tiel riĉa je formoj kiel je esenco, kiam li, atenta pli ol kutime, aŭdas kanti „*Gloria Patri et Filio et Spiritui Sancto*”. La litanioj plenplenigas lian memoron je substantivoj: *causa nostrae laetitiae, regina prophetarum*; la konataj himnoj de l’ „Laŭdo” plenaj je adjektivoj, facile estas lernitaj parkere kaj baldaŭ rekompencas la eklernanton. La dialogoj de l’ kantiko de Salomono, entenataj en la „*Maria-horoj*”, liveras la pronomojn, same kiel la lasta Evangelio el la Meso.

Ĉi tiu instruo lin interesas, ĉar ĝi malkovras sekretajn trovaĵojn malantaŭ en lia kapo; ĝi stimulas, ĉar ĝi alkuragiĝas propran ekzamenon. La surprizita lernanto tuj ekprenas sian misalon, kiun li estintece pli-malpli uzadetis nur per helpo de traduko aŭ parafrazo.

Ĉio tiom intime alparolas lin, li kapsalutas la nune ne plu nekompremitajn vortojn kiel bonvenajn konatulojn de konatuloj, kies komision li jam antaŭscias. Kompreneble, ĉio ĉi tio ne estas lernata senpene — inspiro estas rezervata al sanktuloj, intuitivo al genio, senpera kontemplacio al anĝeloj; tamen lia laboro, penado fariĝis plezuro pro la entuziasmigo de l' nobla celo kaj pro la kontentiĝo pri l' sukcesa rezultato. Tiele ja lia lernado ne fariĝas ludado — postulo por la infan-ĉambro —, sed lia lernado estas legado — postulo por la praktika vivo.

Miopinie, laŭ ĉi tiu sankta vojo, kvazaŭ en procesio de benataj tekstoj, interesiĝinto en malmulte da tempo laŭvorte komprenos la „Ordinaron de la Meso”; foje li tradukos psalmon malgraŭ sia minimuma teorio-sciado; propramove li ja montros mem-tradukitan himnon al sia instruisto; kaj tiamaniere li iom-post-iome estas inicita en la grandvaloraj trezoroj de l' eklezia literaturo. Li konsultas Gregorion la Grandan pri Benedikto, kaj Bonaventuron pri Francisko, li pripensas la meditadojn de Anselmo, ĝuas la predikojn de Bernardo, pristudas la difinojn de Trente, ĝis kiam li prefere serĉas sian edifon ĉe l' incens-odora lingvo latina, (tion faciligas al li multaj poŝeldonoj), ĝis fine, serioza lernanto kuraĝas legadi en ilia propra lingvo la plej potencajn ekleziopatrojn kaj Doktorojn, kiel Aŭgustinus' on kaj Tomaso'n Aquinas. Tio estas idealo — hontige estas nehavi, tute ne hontige jes havi idealon — sed ĝi ne estas iluzio, ĉar tiuj esperoj bazitaj estas sur la eterna riĉeco de l' eklezia lingvo. Eks-studento ne plu prenos el sia libroŝranko „Ciceronon” (supozite ke li ankoraŭ posedas ekzempleron). Ĉar, la de Cicerono vanta elokventeco ne emociigas nin; sed, ekzistas kristanaj Ciceronoj, malpli formalaj, tamen senfine pli altecaj, abundaj kiel la Vorto Dia, el kiu ilia bela saĝeco elfluis.

Miaj imagaj lernantoj¹⁾ estas en tre favoraj kondiĉoj.

1) Ĉi tiu supozo pruvis esti ne senfunda tiam, kiam la societo „de Violier” en Amsterdam organizis kurson, kies rezultaton nur post iom da tempo oni povos plene prijuĝi. Ankaŭ okazaj vizitantoj

Ili estas *memvoluloj* aŭtodidaktaj, *plenaĝuloj* sciantaj la francan lingvon, tiun idon de l' lingvo latina, kaj precipe scipovantaj metode labori kaj kombini, kio kompanse anstataŭas la freŝan memoron de infano. Ili estas *instruituloj*, dezirantaj trapenetri ĝis la fontoj de l' kredovivo, kaj fine *Katolikoj*, por kiuj la liturgio estas la centro de ilia religio. Se ĉi tiu forta inklino estu ne kontraŭ-batalata, ĝi (per si mem) naskiĝos ĉe multaj personoj, kelkaj eĉ rigardos tiun taskon kiel sian profesio-devon, nome la preĝej-kantistoj kaj primaloke iliaj direktoroj, kiuj kelkfoje skandalige kripligas la sanktajn tekstojn ĉe l' kantado, eĉ tiele, ke persono, malfeliĉe scianta la latinan lingvon, pli estas distrigita ol edifita. Sed, de muzikala flanko la respekto al liturgio kaj al ĝia kompreniĝado nune tiom kreskis, ke pliboniĝo nepre sekvos. Ĉar, la malnova indiferenteco ne plu estas sendanĝera inter S-taj Benedikto kaj Gregorio. Kiu ŝcias, kiom proksima jam estas la estonteco, kiam muzikisto, ne scianta la lingvon latinan, estos escepto.

Plej multe tion deziros sendube la monaĥoj kaj monaĥinoj, precipe la ĥorej-fratinoj kun ĉiutaga brevier-preĝado. Modelo inter ili estas la Benedikten'inoj, vere sciantaj la preĝ-lingvon.

Ankaŭ la fratinoj en aktivaj kongregacioj (ordenoj), lernej- kaj malsanul-fratinoj, refreŝiĝos de l' peniga laboro, kune preĝante la „Oficion” en la kapelo. Kaj, ĉu tio ne taŭgas ankaŭ por ĉiuspecaj relegiemaj, preĝejiremaj inoj en la „mondo”, por aninoj de l' Societo „Al honoro de l' Plej Sankta Sakramento”, kiuj tiamaniere daŭrigas la seninterrompan adoradon „*in hymnis et canticis*”, kaj kiuj, preĝante-kantante, surbrodas sur la paramentoj la tekstojn, skribitajn ja por homoj, ne por anĝeloj? Kial, por ununura vojaĝo, tiom da fraŭlinoj lernas la Svedan aŭ la Italian

estis surprizitaj de la seriozo kaj fervoro de la tridek ge-partoprenantoj. La ekzemplo, ĉie en nia patrujo vekis interesiĝon, ne malpleje inter la pastraro. Tio igas esperi ĝeneralan imitadon, kiam la lernolibro ekaperiĝos.

lingvon?, kial ne la latinan lingvon por la regula preĝej-
vizitado?

La demando ne estas demando por mi, kiu volonte estis
allogita al ĉi tiu entrepreno, iniciginte renaskiĝintan infa-
non de l' Patrin-eklezio en ĝia spirita patrin-lingvo.

D-ro GERARD BROM.

Tradukis: FRANS SLEIJFFERS (Hago).

OFICIALAJ SCIIGOJ.

Starigo de Akcia Societo, nomita:

„Internacia Eldoniga Societo „ESPERO KATOLIKA”.

P-ro RICHARDSON kaj D-ro SMULDERS sciigis en la
Nov-a N-ro de *E. K.* (p. 287), ke ili „aĉetis *Espero Katolika*
de la nuna posedanto, por kaj je nomo de I. K. U. E.,
celante kiel eble plej baldaŭ starigi internacian societeton,
konsistantan el membroj de I. K. U. E. kaj tiam transdoni
la posedaĵon de *Espero Katolika* al tiu Societo”.

Post akurata ekzamenado de la posedaĵoj kaj ŝuldoj de
E. K. kaj post konsiliĝo kun nia leĝa konsilanto, lia ŝtat-
konsilanta moŝto Mr. TH. BORRET, ni elektis por laŭleĝa
starigo de suprenomita societo Notarion.

Tiu ĉi pristudis serioze la demandon kaj jam pretigis
projekton de Regularo, kiu post nia aprobo devas akiri la
reĝinan aprobon (aprobon de la Nederlanda Registaro).
Post tio la akcia societo estos definitive starigata en la
oficejo de la notario kaj aperos sciigo pri la starigo kaj
ĝia Regularo en la Nederlanda Ŝtatgazeto (espereble en
Nederlanda kaj en *Esperanta* lingvoj).

Estas nun dezirinde, kiel eble plej baldaŭ sciigi pri la
partoprenontoj, kiuj aĉetos akciojn. Ĉi sube ni transskribas
kelkajn donitaĵojn el la projektita Regularo, por ke niaj
legantoj povu prijuĝi la karakteron kaj seriozecon de la
starigota societo kaj decidi fariĝi akciuloj.

La intenco estas starigi akcian societeton, ne nur por pagi

al la antaŭa posedanto de *E. K.* la aĉetsumon kaj por propagandi kaj pligrandigi *E. K.*, sed ankaŭ por favori kaj ebligi la eldonigon de ĉiuspecaj katolikaj presitaĵoj (libroj, broŝuroj, adresaroj, jarlibroj, specialaj revuoj k. t. p.).

La *societa kapitalo* estas 10.000 spesmilojn (12100 guldenoj = holandaj florenoj), dividita en 200 akcioj je nomo po 50 Sm. (*f* 60.50), el kiuj je la stariga dato estos eldonataj kaj plenverŝitaj 40 akcioj = 2000 Sm. (la kvinona de la societa kapitalo laŭ postulo de la Nederlanda leĝaro).

La akcioj estas *je nomo*, t. e. la posedanto de ĉiu akcio estas unu konata persono, kies nomo kaj adreso estas enregistrita. Do oficiale nur unu konata persono povas esti posedanto de iu nedividebla akcio. Kompreneble pli ol unu persono povas aĉeti *kune* akcion (ekz. 5 personoj pagas ĉiu 10 Sm. = kune 50 Sm.), sed nur unu persono estas enregistrita kiel posedanto.

La akciuloj devas esti membroj de I. K. U. E. kaj abonantoj de *Espero Katoliko*, en kiu aperos la oficialaj sciigoj de la A. Societo.

Ĉiujare dum la internacia katolika kongreso okazos la ĝenerala kunveno de akciuloj (aŭ iliaj riprezentantoj). Prezidos la Prezidanto de I. K. U. E. aŭ lia de li elektita anstataŭanto. La labora programo estos antaŭe anoncita. La akciuloj havas unu voĉon po akcio; tamen unu akciulo ne povas havi pli ol 6 voĉojn.

El la gajno de la A. Societo la akciuloj ricevos maksimume 4 % da interezo (rentumo).

La Estraro de la Akcia Societo konsistas el du *Direktoroj*. Tiuj ĉi estas kontrolataj de la Centra Komitato de I. K. U. E., kiu elektas tri *Kontrolantoj* (Nederlande „Komissarissen”).

La du direktoroj estas la ĉefredaktoro kaj la administranto de „*Espero Katolika*”, kaj estas elektataj de la ĝenerala kunveno de Akciuloj, laŭ propono de la Centra Komitato de I. K. U. E.

La tri kontrolantoj kontrolas la direktorojn; ili havas la rajton tiel kune, kiel aparte viziti ĉiutempe la direktorojn kaj trakontroli ĉiujn leterojn, librojn kaj donitaĵojn kaj la akcian kason. La direktoroj devas doni al ili ĉiujn deziri-

tajn informojn. La kontrolantoj raportas pri ĉio en la ĝenerala kunveno de akciuloj. K. t. p.

Jen kelkaj eltiraĵoj pri ĉefaĵoj el la projektita regularo de la A. S. Krom tio ĉiu eĉ plej malgranda detalo estas priskribita kaj oni povas doni ĉiun konfidon al tiu ĉi laŭleĝe starigota akcia societo.

Finante ni alvokas la I. K. U. E.-membrojn aĉeti akciojn. Ne nur ili apogos „*Espero Katolika*”, sed ili samtempe ebligos la eldonigon de *katolikaj* verkoj en Esperanto, kiuj bedaŭrinde estas tiel malmultaj kaj ĝenerale sensignifaj kompare je la multaj gravaj verkoj en Esperanto ĝisnun aperintaj.

La stariga sumo (40 akcioj) devas esti pagataj *antaŭ la 1-a de Aprilo*. Ni esperas, ke tiuj, kiuj enskribigis sin *provizore* dum „*Nia Dua*” en Hago (Aŭg. 1911), nun *definitive* enskribigos sin kaj ke aliaj imitu ilian ekzemplon, por ke antaŭ la 1-a de Aprilo la 40 akcioj estu plenverŝitaj. La nomojn de tiuj, kiuj konsentis esti akciuloj, ni publikigos en la Marta numero de *E. K.*

Mi estas preta doni ĉiujn deziritajn informojn al interesiĝantoj.

D-ro SMULDERS,
Schijndel (Nederlando).

Kroniko de I. K. U. E.

Tria Internacia Katolika Kongreso de I. K. U. E. en Budapest (Hongarujo).

„La Oka” universala kongreso esperantista en Krakovo okazos 11—18 Aŭgusto 1912. La 23-a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Wien okazos 12—15 Aŭgusto 1912; do bedaŭrinde unu monaton pli malfrue. Se la du kongresoj okazus je datoj pli proksimaj unu al alia, la Katolikaj povus viziti kaj „La Okan”, kaj „Nian Trian”, kaj la Eŭkaristian Kongreson.

Verŝajne „Nia Tria” okazos baldaŭ post „la Oka”. Monsinjoro D-ro Aleksandro GIESSWEINN, la prezidanto de „Nia Tria”, sciigas nin, ke „la 20an de Aŭgusto estas en Hongarlando granda festo, de nia patrono S. Stefano; tio unuflanke estus interesa afero por

la fremdlandanoj, vidi la amason de la popoloj alvenantaj el diversaj partoj de la lando; sed aliaflanke je tiu okazo estas pli malfacile trovi loĝejon. Ni opinias ankaŭ, ke estus prefereble tuj post „La Oka” fari vojaĝon tra la monto de la alta Tatra, la plej bela pejzaĝo de la Hungarlando en la konfino de Galicio kaj Hungarlando kaj komenci „Nian Trian” la 22-an aŭ 23-an.”

En la Marta numero de *E. K.* ni donos pli detalajn informojn. Oni promesis alsendi al *E. K.* regule artikolojn pri „Nia Tria” kaj pri la kongresurbo kaj kongreslando. Baldaŭ la kongreskarto estos preta kaj aĉetebla (verŝajne 2 Sm.) kaj la sekretario-kasisto de la Kongreso sendos al ni ĉiumonate la liston de la pagintaj aliĝintaj kongresanoj, por publikigi ĝin en ĉiu numero de *E. K.*

Niaj legantoj do havu ankoraŭ iom da pacienco. La loka Komitato fervore laboras kaj sciigos al ni baldaŭ ĉiujn sciindaĵojn. Ankaŭ la temoj pritraktotaj jam estas elektitaj kaj ni esperas baldaŭ konigi ilian enhavon, por ke la kongresontoj povu prepari sin kaj praktike partopreni al la laboro farota.

Vivu „Nia Tria”!

Lasta Sciigo: Lia Eminenco Kardinalo Claudius Vaspary, Primato de Hungarlando, akceptas la altan Protektantecon de „Nia Tria”.

KATOLIKA VIVO ĈIULANDA.

La 23a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Wien (Aŭstrio) 1912.

Tiu-ĉi grava religia kongreso okazos *de la 12a ĝis la 15a de Septembro*, protektata de la imperiestro de Aŭstrio, *Francisko Jozefo Ia.* La 12a de Septembro estas datreveno de tiu tago, dum kiu en la 1683a la pola reĝo Johano *Sobieski* kun sia armeo helpis liberigi la ĉefan urbon de la imperio kaj per tio ĉiujn okcidentajn landojn el la jugo de la Turkoj. Sed antaŭ tiu gloroplena venka batalo la reĝo mem kaj ĉiuj liaj soldatoj ricevis la sanktan komunion dum la matena meso en preĝejo sur la monto *Kahlenberg*. Kaj la fina tago de la kongreso koincidas kun la eklezia festo „Nomo de l’ Sankta Mario”, solenata memore de tiu liberigo de la Kristanaro. Do, ambaŭ tagoj estas patriotaj tagoj por Aŭstrio.

Dum la Eŭkaristia Kongreso estos ĉiutage solenaj episkopaj mesoj kaj posttagmezaj Diservoj en la ĉef-episkopa katedralo S.

Stefano, same predikoj de episkopoj kaj de pastroj antaŭ- kaj posttagmeze, honore por la Sankta Eŭkaristio. Ĉiutage estos ankaŭ festa kunveno en la supre nomita katedralo.

En aliaj proksimaj al la katedralo preĝejoj okazos samaj festadoj diversnaciaj. Salonoj estas luitaj por la kunvenoj, en kiuj la kongresaj temoj estos diskutataj.

Honore por la sankta Eŭkaristio la stratoj de la urbo estas ornamitaj, precipe tiuj, kiujn la solena procesio pasos dum la 15a de Septembro.

Speciala delegito de la Sankta Patro ĉeestos la kongreson kaj estos solene akceptata post veturado sur la riverego Danubio.

En ĉiu preĝejo de la tuta urbo ĉiutage katolikoj ĉiurangaj komuniĝos kaj la sankta Eŭkaristio estos ĉiutage elmetata por esti adorata.

Por eksterurbaj partoprenontoj, loĝejoj kaj gvidadoj tra la urbo estos prizorgataj, same kiel malkaraj vojaĝoj kaj specialaj vagonaroj.

Dum la kongreso ankaŭ belega *ekspozicio de ekleziaj artaĵoj* estos vizitebla.

La Kongresanoj pagos *kotizon de 4¹/₆ Sm.*, anoncante sin por partopreno. Por tiu ĉi kotizo ili povos partopreni en ĉiuj aranĝoj kongresaj, ili ricevos kongreso-signon, gvidlibron por Wien kaj kompletan ilustritan raportlibron, post apero alsendatan.

Kiu ĉeestos nur dum kelke da tagoj, tiu povas mendi *bileton potagan* de partoprenanto (Sm. 0.83) laŭ sia deziro kaj havos per tio ankaŭ 50⁰/₀ rabaton de la vojaĝoprezon, same kiel la ceteraj Kongresanoj.

Oni povas ankaŭ profiti la benojn de l' kongreso, *ne ĉeestante persone*. Sendinte la kotizon, ĉiu persono aŭ familio fariĝas kongresano, partoprenas en la benoj por la animo kaj ricevas la raporton, enhavantan ĉiujn predikojn, parolojn kaj proponojn diritajn dum la kongreso.

Ĉiuj demandoj pri la 23a Internacia Eŭkaristia Kongreso en Wien 1912 estu direktataj al la *Centra Oficejo de la Eŭkaristia Kongreso, Wien (Aŭstrio), I. Stefansplatz 5*, ankaŭ per Esperanto. Fidindajn *informojn al Esperantistoj* sendas **S-ro Johano Schröder**, L. K., redaktoro en Wien, VII. Kaiserstrasse 10.

Venu, ni adoru!

(Oficiale komunikita.)

Noto de la Redakcio. Niaj legantoj estas petataj sendi tradukon de tiu-ĉi oficiala komunikaĵo al naciaj ĵurnaloj, aldonante: „Oficiale komunikita al *Espero Katolika*, oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

La „Centrum“-gazetaro en Germanujo.

En la „Sciencaj aldonoj de „Germania“, 1911 n-ro 16, D-ro KL. LÖFFLER publikigas detalan statistikon, el kiu vidiĝas la ĝojiga, senĉesa, forta kreskado de la katolika gazetaro. Gazetoj germanlingvaj, kiuj reprezentas la *Centrum*-partion (katolikan vidpunkton), aperis en Germanujo:

	Ĉiutage.	Ĉiu-semajne 4-foje.	Ĉiu-semajne 3-foje.	Ĉiu-semajne 2-foje.	Ĉiu-semajne 1-foje.	Entute.
1890 . . .	94	—	48	55	75	272
1900 . . .	171	7	94	59	88	449
1909 . . .	278	14	134	83	64	573

Krom tiuj germanlingvaj gazetoj aperas ankoraŭ multaj katolikaj gazetoj en Pola kaj Franca lingvoj.

Ĉe 338 de tiuj 573 gazetoj oni povis konstati precise la disvastiĝon, nome entute 1.938.434 ekzemplerojn; la ceterajn 254 oni taksis po 1500 ekzemplerojn, ĉiuj do entute 381.000 ekzemplerojn. Do ĉiuj katolikaj gazetoj en Germanujo, kiuj aperas en germana (kaj ne en pola aŭ franca) lingvo kune havas eldonon da 2.319.434 ekzempleroj, dum oni por la jaro 1880 akceptis nur 600.000 kaj por 1890 pli ol unu miliono da abonantoj.

Rimarkinde estas tio, kion rimarkas iu furioze kontraŭkatolika revuo post sciigo de supra statistiko al siaj legantoj:

„Neniu kontraŭulo de klerikalismo kaj klerikal-politika propagando neos, ke tiuj ĉi gigantaj kaj ĉiam pligrandiĝantaj ciferoj „pri la etendiĝo de la Centruma kaj tiuspeca gazetaro signifas „teruran danĝeron por Germanujo kaj germana spiritvivo, kaj postulas seriozan priatenton, nepran kontraŭagadon kaj — imitadon.

„Plue per la imitinde fervorega laboro de la „*Augustinus-Vereine*“ „de la „Katolika Gazetaruniĝo“ k. t. p. ankoraŭ senĉese plimultiĝas varbadon kaj novfondadon de ultramontanaj gazetoj.”

Malofta afero! ! Fanatika kontraŭkatolika gazeto proponas la germanajn Katolikojn kiel nepre *imitindajn*! Kompreneble nur pro tio, ke la praktika gazetaragemeco de la germanaj Katolikoj signifas „teruran danĝeron” — ne por Germanujo, sed — por la kontraŭreligia movado.

La sama gazeto instigis ĉiujn kontraŭreligiulojn voĉdoni dum la lasta granda voĉdonado en Germanujo kontraŭ la registaro kaj la *Centrum*-emuloj. Certe la socialista partio akiris multajn voĉojn. Tiu partio de la nekontentuloj profitigis la malamatajn impostojn

kaj la antiklerikalan agadon de ĉiuspecaj ne-Katolikoj. Ĉevalo antaŭ la socialista triumfĉaro: jen la „liberaloj”, la trompitoj. Kaj spite la triumfo la malkontenteco daŭras: ĉar oni ne venkis la unualoke venkotan „klerikalismon”. La *Centrum* revenas pli ol naŭdekopa!

La nenormala per surprizo akirita nombro da socialistoj ne estos daŭra. Kaj konstatinte la gravan katolikan gazetaron en Germanujo, kiu ankoraŭ senĉese pligraviĝas, oni povas esti certa, ke la katolikoj daŭre okupos sian gravan lokon.

Sed... la kontraŭ-katolika revuo instruis nin pri la plej efika, de ili tre timita, agado katolika: fortika katolika gazetaro.

Nur la ekzemplo de la Germanaj Katolikoj ne estu eksklusive imitata de kontraŭkatolikoj: ĉiulandaj Katolikoj imitu la ekzemplon de siaj germanaj fratoj!

D-ro SMULDERS.

Progreso de la Katolikismo.

Itala verkisto. S-ro M. SARDELLI eldonis en Bologna broŝuron pri la progreso de la Katolikismo en diversaj landoj dum la jarcento 1800—1900.

	Nombro da Katolikoj en 1800.	Nombro da Katolikoj en 1900
Anglujo	120.000	2.180.000
Germanujo	6.000.000	20.321.441
Nederlando	800.000	1.822.000
Svisujo	420.000	1.300.000
Rumenujo	16.000	150.000
Bosno-Herzogewino	25.000	398.000
Bulgarlando	1.300	28.000
Servujo	6.000	20.000
Grekujo	15.000	44.000
Rusujo	Tie ĉi en nur 4 jaroj okazis 230.000 konvertiĝoj.	
Afriko	3.000	850.000
Azio	3.000	4.600.000
Unuiĝintaj Ŝtatoj	40.000	22.587.079!!
Kanado	160.000	2.250.000
Aŭstralio	zero	1.600.000

Nekrologio.

Ni ricevis, tro malfrue por tiu ĉi numero, belan artikolon de P-ro RICHARDSON pri S-ro Amatus VAN DER BIEST, prezidinto de „La Sepa” en Antverpeno, kies bedaŭrinda morto estas grava perdo por nia movado. La artikolo aperos en la Marta numero.